# La 27an de aŭgusto 2016

## Kio estas la situacio de Fukuŝima?

La unua Internacia Patrino Kongreso okazis en Svislando en 1954, la jaro, kiam okazis usonaj eksperimentoj de hidrogenbomboj en la suda Pacifiko. Pro la eksperimentoj mil japanaj fiŝkaptistaj ŝipoj suferis kaj radioaktiva pluvo falis sur Japanion kaj certe sur la tutan terglobon. Pro la timo patrinoj en la tuta mondo organizis tiun kongreson, sed bedaŭrinde neniam plu okazis la internacia patrina kongreso en la mondo krom en Japanio. Nur japanaj patrinoj seninterrompe organizadas la kongreson ĉiun jaron, kaj en tiu ĉi jaro ĝi atingis la 62an kongreson. Pro tiu historio patrinoj partoprenantaj en la kongresoj havas grandan intereson pri nukleaj aferoj, do ankaŭ en tiu ĉi kongreso, kiel senigi nukleajn centralojn el Japanio estis unu el la plaj gravaj temoj.

La fakkunsido “Energio kaj nukleaj centraloj” okazis en la gubernio Fukui, kie troviĝas 15 reaktoroj. En la kunsido patrinoj, kiuj agadas kontraŭ la nukleaj centraloj en sia gubernio, konkure surpodiiĝis kaj raportis pri sia, foje sukcesa, foje malfacila, agado. Ankaŭ mi volis raporti pri mia raportado per Esperanto, sed bedaŭrinde mi ne estis akceptita. Eble oni ne bone sciis, kio estas Esperanto kaj krome mia propono estis tro internacia por la organizantoj.

Dum tiu kunsido mi miris pro energio kaj entuziasmo de la patrinoj. La slogano de la kongreso estas “Patrinoj, kiuj naskas vivon, protektas kaj flegas ĝin”. Vere patrinoj estas fortaj.

**Patrinoj de la gubernio Aomori raportas pri sia batalo kontraŭ la konstruata nuklea centralo Ooma.**

Fine de la kunsido prelegis s-ro Itoo Tacuja, kiu loĝas en la urbo Iŭaki, Fukuŝima, kaj laboras kiel estrarano de “Tutjapana Centro de kontraŭnukleenergiaj movadoj”. La temo de lia prelego estis “Ni ne plu ripetigu nukleajn akcidentojn”.

## 1. Nun, 5 jarojn post la akcidento en Fukuŝima

(1) En 6 urboj damaĝitaj de la akcidento nun neniu loĝas. La loĝantaro de Fukuŝima malpliiĝis je 5,7%. Tio estas la plej granda malpliiĝo en Japanio.
(2) Eĉ post 5 jaroj okazadas nerektaj mortoj pro la akcidento (akcident-rilatantaj mortoj pro malbona flegado post la Katastrofo, ŝanĝiĝo kaj malriĉiĝo de vivo, malespero, sinmortigo ktp.). La nombro de rektaj mortoj pro la cunamo estas 1604, sed la rilatantaj mortoj estas 2006 (ĝis decembro 2015).
(3) Ĝis perfekta forĵeto de tiuj difektitaj reaktoroj oni bezonos pli ol 40 jaroj. Oni ankoraŭ ne scias, kie kaj en kia stato estas fandiĝintaj nukleaj brulaĵoj. Se oni kovros la reaktorojn per "ŝtona ĉerko" same kiel en Ĉernobil, oni devos prizorgi ilin dum la venontaj kelkcent jaroj.
(4) La registaro planas (parte komencis) konstruigi "provizoran konservejon de poluitaĵoj," kiu etendiĝos en ambaŭ urboj Ookuma kaj Futaba, kaj ĝi promesas, ke 30 jarojn poste ĝi transportu tiujn poluitaĵojn ekster la gubernio Fukuŝima, sed neniu kredas tiun promeson. Certe tiu fariĝos eterna konservejo.
(5) En iuj urboj poluitaj de nukleaĵoj kaj poste "purigitaj", nun la loĝantoj povas reveni, sed ili ne povas facile reveni pro manko de hospitaloj, vendejoj kaj aliaj necesaj funkcioj kaj pro timo al radioaktiveco.
(6) La registaro ne havas planon senpoluigi la dense poluitajn urbojn.
(7) Oni trovis 161 infanojn, kiuj suferas pro tiroida kancero, kaj 42, kiuj havas suspekton pri tio. Inter

esploristoj kaj kuracistoj estas du opinioj. Iuj atribuas tion al la nuklea akcidento, sed aliaj ne. Aparte de kaŭzoj, oni devas varme kaj longe prizorgi tiujn infanojn.

(8) Malharmonio okazas inter la suferantoj de la akcidento. La registaro dividis ilin per distanco inter iliaj domoj kaj la nuklea centralo, per kvanto de radioaktiveco en iliaj loĝlokoj, kaj per kvanto de kompensa mono laŭ la supraj kriterioj. Ni devas venki tiun malharmonion kaj regajni solidarecon inter la suferantoj.

## 2. Movadoj kontraŭ nukleaj centraloj

(1) Antaŭ la 11a de marto 2011

- Ni batalis en la juĝejoj kontraŭ la konstruo de la nukleaj centraloj, sed malvenkis.
- "Tutjapana Centro" avertis la registaron kaj TEPCO-n kelkajn fojojn pri danĝero de eblaj grandaj cunamoj, sed ili tute ne aŭskultis nian averton.

(2) Novaj vidpunktoj post la katastrofo

- La movado kontraŭ la nukleaj centraloj fariĝis granda tutjapana movado, en kiu ĉiuj povas partopreni.
- La grupoj, kiuj subtenas la nukleenergian politikon, ankaŭ subtenas nuklearmilan politikon kaj provas ŝanĝi la 9an artikolon en Japana Konstitucio, kiu malpermesas militon kaj posedon de armeo. Tial ni devas havi fortan solidarecon kaj kuniĝintan agadon inter niaj tri movadoj, kiuj celas protekti vivon de la popolanoj, nome movado kontraŭ nukleaj centraloj,

movado por aboli nukleajn armilojn kaj movado por protekti Japanan Konstitucion.

**3. Kio estas grava por ne ripetigi nukleajn akcidentojn**

(1) Ni dividu faktojn, spertojn kaj lecionojn de la nuklea akcidento inter ni.

(2) Ni havu komunan komprenon pri jenaj danĝeroj de japanaj nukleaj centraloj.

1) Danĝero pro manko de sufiĉa teknologio, precipe danĝero de bolakvaj reaktoroj kaj danĝero pro kadukaj reaktoroj.

2) Danĝero pro la speciala kassistemo de la elektraj kompanioj. Dank' al tiu avantaĝa sistemo ili povas libere kolekti monon el la poŝo de la popolanoj, kiam ili "bezonas" ĝin kaj povas konstruigi nukleajn centralojn laŭ sia volo kaj sen financa problemo.

3) Danĝero pro la geologia strukturo de la japana insularo, kie ofte okazas tertremoj kaj vulkanaj erupcioj.

4) Danĝero pro geografia vidpunkto. Nukleaj centraloj situas proksime de urboj kaj vilaĝoj. En malgranda tereno de nukleaj centraloj staras pluraj reaktoroj.

5) Danĝero pro manko de internacinivela regularo por kontroli la nukleajn centralojn. Nur troviĝas por-registara kaj por-elektrakompania komitato nomata "Nuklea Reguligada Aŭtoritato"

6) Danĝero pro profitcela sinteno de la elektraj kompanioj. Ekzemple, kiam okazis la grandaj tertremoj

en Kumamoto en aprilo 2016, la elektra kompanio Kjuuŝuu neniam intencis haltigi la reaktorojn.

(3) Ni havu komunan ideon por konstrui urbojn ne dependantajn de nuklea energio.

(4) Ni havu komunan ideon pri cikliga energio. Ĉie en Japanio troviĝas naturaj, cikligaj energifontoj, kiujn ni povas utiligi laŭ la bezono de la regiono kaj per malgranda kapitalo kaj el kiu ni povos profiti.

**4. Estonteco de Fukuŝima**

(1) Ĉiuj urboj en Fukuŝima postulas forĵeton de ĉiuj 10 reaktoroj en Fukuŝima, tamen TEPCO kaj la registaro silentas.

(2) Fukuŝima celas, ke ĝi estu gubernio de cikliga energio. Tio estos la plej granda kontraŭbato al la registaro kaj TEPCO, kaj samtempe per tio ni dankas al ĉiuj, kiuj helpas Fukuŝima-n.

**Granda salono estas plenaj de virinoj el la tuta Japanio.**